

Zamenhof-jaro 2009:

Esperanto historie en Bjalistoko

Bone konata estas la letero de Zamenhof al Borovko en kiu li klarigis kiel aperis ĉe li la ideo krei lingvon internacian: „Mi naskiĝis en Bjalostoko, gubernio de Grodno.¹ Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjalostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi ‚doloro pro la mondo‘ ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la ‚grandaĝaj‘ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon. Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniuj el la nun vivantaj nacioj. (...) Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo.“ (...)

Bjalistoko – la urbo de L.L. Zamenhof

Bjalistoko, naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof, ludis kaj daŭre ludas gravan rolon en la historio de la Esperanto-movado. Dum multaj jardekoj pulsas tie vigla Esperanto-vivo. Aktivadis tie kaj en la ĉirkaŭaĵo centoj da esperantistoj sindediĉaj al la movado. Ĝis nun restas neesplorate, kiom da esperantistoj ekzistis en Bjalistoko tuj post la apero de la *Unua Libro* en 1887. Eblas tamen supozi, ke Zamenhof interesiĝis pri la kresko de la ideo en tiu urbo kaj ke dekomence la Esperanto-movado havis tie kelkajn adeptojn. Fakte, en la *Unua adreso de esperantistoj* estas menciitaj (1890) kvar bjalistokanoj. La nomoj Bramsohn kaj Rosenthal montras, ke ili devis esti juddevenaj. Tio certe vekis la suspekton de la carista administracio. Simple en Bjalistoko la kondiĉoj por disvastigi Esperanton ne estis favoraj. Ekde 1873 Zamenhof loĝis en Varsovio, kie ja, kiel konate, la Esperanto-projekto maturiĝis kaj estis publikigita, kaj kie ĝi trovis la unuajn seriozajn adeptojn. Alia klarigo, laŭ N.Z. Maimon, pri la

¹ Ĉi tiu gubernio de la Cara Imperio troviĝis ekster la tiama Pola Reĝlando (nomata ankaŭ Kongresa Pollando aŭ Vistula Lando).

malforteco de Esperanto en Bjalistoko, estis la cirkonstanco, ke Zamenhof forlasis la cionismon, kio tute ne plaĉis al la bjalistokaj judoj.

Unua impulso por vigligi Esperanton en Bjalistoko estis donita en majo 1910, kiam dum renkontiĝo kun sepdeko da ĉeestantoj estis esprimita la intenco fondi Esperanto-asocion. Bedaŭrinde tiu unua provo antaŭ la unua mondmilito fiaskis, tiel ke dum la vivotempo de Zamenhof Esperanto en Bjalistoko restis senrezulta. Cetere la unua mondmilito grandparte interrompis ĉie la Esperanto-agadon,² krom tio la poloj estis tro okupataj pri la restarigo de sia ŝtata sendependeco, kiun ili malhavis ekde 1772/95.

Samtempe falis hela Esperanto-stelo de la ĉielo, kun kiu la posta evoluo de Esperanto en Bjalistoko estos nedisigeble ligita: tiu stelo portis la nomon de *Jakób Szapiro* (Ŝapiro, 1897-1941), kiu lernis Esperanton en la aĝo de 14 jaroj kaj komencis aktivadi en 1911. En 1915 li publikigis porpacan broŝuron *La mondmilito kaj Esperanto*, kiu aperis ĉe la Biblioteko de Georgo K. Davidov en Saratovo. Post la milito Ŝapiro abunde publikigis informojn pri Esperanto en la loka gazetaro kaj lobiis ĉe la urbaj instancoj, kaj baldaŭ povis okazi Esperanto-kurso en vespera lernejo. Krom tio, li atingis la alinomigon de la Verda strato je la strato Zamenhof. En la zamenhofa dometo, kiu troviĝis en sufiĉe mizera stato, loĝis teretaĝe iu Szturmakiewicz, kiu prizorgis la Memorlibron pri Zamenhof, kaj en la unua etaĝo loĝis iu horloĝisto kun la nomo Wajnsztok. Aktualis eĉ la ideo de Esperanto-muzeo, sed ĝi restis neefektivebla.

ZES kaj Jakobo Ŝapiro

Granda momento por Esperanto en Bjalistoko alvenis la 21an de novembro 1920, kiam okazis la organiza kunveno de bjalistokaj samideanoj. En la ĉeesto de 20 personoj sub la protekto de Jakobo Ŝapiro, delegito de UEA, la prezido de J. Alfus el Krakovo kaj la sekretario de R. Platzek estis decidite fondi societon kun la nomo Zamenhofa Esperanta Societo en Białystok (ZES). La elektita estraro konsistis el J. Ŝapiro (prezidanto), F. Kurjański (skretario), R. Platzek (kasisto), S. Kaplan kaj S. Liberman. La sekve organizitaj Esperanto-kursoj allogis 70 interesulojn. Inĝeniero Morduch Zabłudowski eĉ sukcesis instrui Esperanton en hebrea popollernejo. „La loka gazetaro favoras nian movadon“, konkludis la raporto de ZES. Diversaj eminentuloj de la urbo aliĝis kiel membroj de ZES, inter ili la redaktoro de la plej grava bjalistoka gazeto. Tiel, iom post iom Bjalistoko fariĝis internacie konata dank’ al la Lingvo Internacia de L.L. Zamenhof. Malgraŭ tiuj sukcesoj, ZES ne trovis publikan sidejon kaj devis okazigi siajn kunvenojn en privata loĝejo. Do, la hejmo de Ŝapiro, situanta en strato Lipowa 33 tre proksime de la zamenhofa strato, longe servis kiel Esperanto-centro de Bjalistoko en la intermilitaj jaroj, kaj nur la 17an de julio 1922 ZES povis esti laŭleĝe registrita laŭ vojevodia decido. Ĉi tiu agnosko havigis al la juna asocio novajn agadperspektivojn. Sed fluis ankoraŭ du jaroj, por ke en 1924 finfine okazu la solena malfermo de ZES. En 1923 Ŝapiro prilaboris la unuan gvidlibron tra Bjalistoko en Esperanto, kiu estis eldonita de Teo Jung, redaktoro de *Esperanto Triumfonta*, en Kolonjo en 1923. Ŝapiro apartenis ankaŭ al la kunfondintoj de la Turisma Komisiono de UEA, kaj la bjalistoka ĉefesperantisto mem fondis propran eldonejon, kie aperis kelkaj verkaĵoj, inter alie liaj

² La gazeto *Pola Esperantisto* ne aperis inter 1914 kaj 1922.

Babiladoj de bonhumora Zamenhofano. La herooj en tiu libro nomiĝas s-roj Neskribemski, Oratoremulov, Reformemski, Parolulov, Fervorulov, Flirtemulov, Kritikoviĉ, Fundamentistov, f-ino Ridemoviĉ, ktp. Eĉ Marie Hankel, la unua signifa Esperanto-verkistino, amuziĝis. Krom tio Ŝapiro verkis Esperanto-Ŝlosilon en la jida lingvo. Liajn Esperanto-tradukojn aperigis ekzemple *Germana Esperantisto* en la periodo 1912-18, kaj liaj verkoj trovis aljuĝon de premioj en la Floraj Ludoj. Alprenante starpunkton en soci-politikaj aferoj, Ŝapiro decide kontraŭstaris antisemitismajn tendencojn. Pro tiu kuraĝo Ŝapiro estis atakata dum la 30aj jaroj.

20aj jaroj

Dank' al ofta raportado en la loka gazeto *Dziennik Bialostocki* oni estas sufiĉe bone informita pri la aktiveco de ZEA dum la 20aj jaroj. En 1925 Ŝapiro partoprenis la 17an Universalan Kongreson de Esperanto en Ĝenevo, kie Edmond Privat, prezidanto de UEA, kelkfoje laŭde menciis Bjalistokon en sia malferma salutparolado. Al la elstaraj eventoj en Bjalistoko mem apartenis en januaro 1926 prelego de Leo Belmont pri la kontraŭjudaj procesoj okazintaj antaŭ la unua mondmilito, kaj en majo 1927 la vizito de la japana sciencisto prof. Hazime Asada. Poste la urbon vizitis ankaŭ aliaj japanoj. La Tutpollandan Kongreson de Esperantistoj en oktobro 1926 partoprenis J. Ŝapiro. La 1a Postkongreso Esperantista okaze de la 19a Universala Kongreso (UK) en (la Libera Urbo) Dancigo en aŭgusto 1927 estis organizita, krom en Varsovio, ankaŭ de la bjalistokaj esperantistoj. Ĉi tiu solenaĵo estis gravega evento en la urba vivo. Ĝin partoprenis 188 personoj, inter kiuj 123 el Pollando, la resto el diversaj eksterlandoj. La alvenintajn gastojn salutis la orkestro de la 3a regimento de ĉevalpafistoj per la himno 'La Espero'. La pavimo de la Zamenhof-strato estis speciale renovigita, kaj la programo antaŭvidis malkovron de memortabulo sur la zamenhofa naskiĝdomo. La urba magistrato rifuzis akcepti la protekton super la Postkongreso, ĉar tio estis ligita kun neceso aranĝi bankedon. Tamen, poste klariĝis, ke la vojevodo persone, inĝ. Marian Rembowski, konsentis esti protektanto de la Postkongreso. Oni decidis sendi leteron kun salutoj al ŝtatsprezidento Ignacy Mościcki kaj al marŝalo Józef Piłsudski. Teo Jung, redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, laŭdis la bonegan akcepton flanke de la organiza komitato, lokaj instancoj kaj enloĝantoj. Dum plaĉis al li la hotelo Ritz, li miris pri la malbonaj stratvojoj, kaj ke en ĉiuj taksioj ne funkciis kalkuliloj.

La postkongreso tre aktivigis la bjalistokanojn. Estis organizitaj kursoj, ĉefe en judaj societoj, kiujn partoprenis 150 personoj. Laŭ la nomoj el tiu tempo, partoprenantoj estis ĉefe judoj kaj poloj. Nemalhaveblan rolon ludis daŭre J. Ŝapiro, ĉefdelegito de UEA en Pollando, kiu organizadis, prelegadis, instruadis. La lingvo Esperanto estis enkondukita en iujn klasojn de la publikaj popol-lernejoj de Bjalistoko. Dum iu foiro en 1928 la esperantistoj reprezentis sin, kaj „la vizitantoj montris grandan intereson por nia afero“, oni raportis. En siaj vicoj ZES posedis profesian kantiston, Szymon Osowicki, kiu gvidis la programojn de la Dram-rondo de ZES. En oktobro 1929 okazis, kun centoj da partoprenantoj, la Unua Esperantista Kongreso de la bjalistoka vojevodia regiono, kiu estis honorata de la bjalistoka urbestro per sia alta protekto. Felikso Zamenhof, kiu ankoraŭ naskiĝis en Bjalistoko, faris la enkondukan paroladon. Estis decidite turni sin al

la bjalistoka urbestro kun peto subvencii la bezonojn de Esperanto-agado, kaj precipe pri la aĉeto de la naskiĝdomo de L.L. Zamenhof. Tamen, ĉi ideo neniam efektiviĝis.

En multaj lokoj de la bjalistoka vojevodio oni laboris por Esperanto: krom en Bjalistoko ankaŭ en Augustów, Bielsk Podlaski, Choroszcz, Ciechanowiec, Gaworowo, Grajewo, Grodno, Indura, Krynki, Łomża, Michałów, Orla, Ostrołęka, Płoski, Rzędziany, Sejny, Sokółka, Szczuczyn Białostocki, Śniadowo, Topolany, Waliły, Waniewo, Wasilków, Wołkowysk kaj Żelechy. Post la 2a mondmilito la Esperanto-movado en tiuj lokoj ne plu ekzistis. La aktivularo pereis dum la ekstermado de la juda loĝantaro, kaj kvankam ekde la milito-fino pasis pli ol 60 jaroj oni ne sukcesis tie enradikigi Esperanton denove.

30aj jaroj

Tiel, Bjalistoko iom post iom fariĝis la „Mekko” de la internacia Esperanto-movado. Ĝuste komence de la 30aj jaroj ZES aranĝis amason da Esperanto-kursoj en la nova sidejo ĉe strato Polna 4. Komence de 1931 okazis en Bjalistoko grava evento por la instruado de Esperanto. La loka gazeto raportis pri la fondo de la unua oficiala Ekzamen-Komisiono de Esperanto ĉe ZES. Fakte la Ministerio de Klerigo kaj Konfesioj leĝigis Instituton de Esperanto por tuta Pollando, kiu okupiĝos pri instruado de Esperanto, havigos diplomojn kaj rajtigilojn por instruistoj. Prezidanto de la ekzamenkomisiono fariĝis J. Ŝapiro. En marto de la sama jaro estis prezentita de la Esperanto-Revuo-teatro „Verda Muelejo” Granda Varieteo kun la ĉeesto de 300 spektantoj, kaj fine de marto Bjalistokon vizitis la bengala esperantisto Lakshimiswar Sinha, kies prelegon pri moroj kaj kutimoj en Hindujo kun lumbildoj allogis preskaŭ 200 homojn. Sinha kantis bengalajn kantojn, estis akceptita de la urba starosto kaj miris, ke en la urba biblioteko troviĝis hindaj literaturaĵoj.

Denove postkongreso en Bjalistoko

Sed fakte ĉiuj fortoj de tiu tempo estis koncentritaj al la 2a Internacia Postkongreso aldone al la 23a Universala Kongreso en Krakovo en 1931. Estis planate dum ĝi starigi fundamenton por Zamenhof-monumento, ĉar oni konsideris kiel honton, ke diversloke en la mondo tiaj monumentoj estis jam starigitaj, dum en Bjalistoko ĝi mankis. Pri la postkongreso Ŝapiro publikigis detalan raporton en *Pola Esperantisto*. Laŭ tio alvenis al Bjalistoko karavano de 60 personoj, fakte malpli ol atendite, kiu estis akceptita en la stacidomo de militista orkestro, kiu ludis „La Esperon”. La ĉefa evento dum la postkongreso estis la solena inaŭguro de la fundamento por la kreota Zamenhof-monumento. La lokon elektis la vojevodo mem, kiu havis la funkcion de honora protektanto de la komitato por konstrui la monumenton. Sed pro kuracado en alia urbo li forestis kaj tial estis reprezentita de la vic-vojevodo. Same persone ne ĉeestis la urbestro, kiu estis anstataŭita de la vic-urbestro, kaj do kun tiuj duarangaj oficialuloj la fundamento por la monumento povis esti efektive metita plensolene. La ceremonion ĉeestis diversaj eminentuloj kiel familianoj de Zamenhof – Leono, Lidja kaj Zofia – krome Robert Kreuz, direktoro de la Internacia Centra Komitato (ICK) de la Esperanto-movado, kiu alveturis el Ĝenevo, kaj kelkaj aliaj. En vespera kunveno la ĉeestantoj

memorigis, ke dum la postkongreso en 1927 estis promesite starigi la monumenton al la kreinto de Esperanto. Sed la aŭdigita mesaĝo estis klara: la finkonstruo de tiu monumento – en formo de babelturo – dependas de la tutmonda esperantistaro, kiu devus helpi al la organiza komitato efektiviĝi tiun ĉi ideon. Plej kortuŝa momento dum la kongreso estis la vizitado al la zamenhofa dometo, kiu estis feste ornamita, sed restis malriĉa kabano, en kiu kuŝis sur tableto, speciale por la postkongreso preparita Ora Libro de Vizitantoj, en kiun la kongresanoj enskribiĝadis unu post la alia. La postkongreso mem estis komentita tre pozitive ne nur de la bjalistoka gazetaro, sed ĝi trovis sian vastan eĥon ankaŭ en la Esperanto-gazetaro. Tiel okazis, ke la dua internacia postkongreso esperantista de 1931 estas konsiderata kiel pinta aranĝo de la bjalistokaj esperantistoj antaŭ la milito. En aŭgusto aperis en Bjalistoko ankoraŭ la Joseph Scherer el Usono, fama svisdevena Esperanto-mondvojaĝanto, kiu prelegis pri la filmourbo Hollywood.

Sed la bonaj tempoj baldaŭ konvertiĝis en malbonajn.

Antisemitismo, degenero kaj pereco

La plej fruktodonaj jaroj por ZEA estis tiuj inter 1927 kaj 1931. Poste la ekonomipolitika situacio ne favoris la Esperanto-agadon. Bedaŭrinde el eksterlando mono ne venis por helpi realigi la starigon de la zamenhofa monumeto. Male, aperis fruaj signaloj de kontraŭesperantismo ligita kun politika eskremismo kaj antisemitismo jam en 1932 en iuj klerikalaj bjalistokaj gazetoj, en kiuj la aŭtoroj ne hezitis levi voĉojn kontraŭ la starigota Zamenhof-monumento. Iu pastro-kanoniko polemikis kontraŭ Esperanto menciante, ke malgraŭ granda propagando tiu nova lingvo ne trovis multajn adeptojn. Kaj li pledis por latino, eterna lingvo de la eklezio. Sekvis retorika atako kontraŭ la zamenhofa monumento, kiun oni ne volis vidi sur la skvaro en la centro de urbo, dum la monumento de la Nekonata Soldato staras en iu parko. La pastro postulis, ke la Zamenhof-monumento estu prefere starigita en la urba parko, kiu estas ŝatata kaj vizitata amase de la juda loĝantaro, kaj ke la monumento de la Nekonata Soldato estu translokita en la urban centron. Finfine Bjalistoko estus ne nur urbo juda kaj katolika, sed ankaŭ pola kaj patriota. El la sama ideologia medio sekvis polemiko kontraŭ J. Ŝapiro mem. La prezidanto de ZES estis atakata pro „subjektiveco“ kaj „favorado al judoj“.

En tiu periodo ZES ricevis nur malmultajn eksterlandajn vizitojn, inter kiuj la ĉefaj estis tiuj de la blinda hungara pianisto Imre Ungár, de Edward Wiesenfeld, redaktoro de la pola fako de „Enciklopedio de Esperanto“, kaj de Karl Liniger el Svislando, tiama prezidanto de UEA. La plej signifaj eventoj estis en 1932 la dediĉa vespero okaze de la 15a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof kaj la dumkongresa ekskurso kadre de la 29a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1937, kiu estis jubilea pro la 50-jariĝo de la Lingvo Internacia. Alvenis kelkcent kongresanoj, inter ili la filinoj de Zamenhof, Zofia kaj Lidja, kaj lia nepo Ludoviko. Ĉi tiu aranĝo estis kvazaŭ la adiaŭa al la bjalistokaj kaj pollandaj esperantistoj antaŭ la dua mondmilito kaj la holokaŭsto, kiu forrabis la plimulton de tiuj esperantistoj. Nekonsciante pri la neimagebla tragedio, kiu trafos Bjalistokon, ĝia urbestro Nowakowski ankoraŭ plenforte honoris la verkon de Zamenhof, direktante jenajn vortojn, tradukitajn de Ŝapiro, al la ĉeestantoj: „...mi

deziras, ke la lingvo Esperanto plue sukcesu kaj floru kaj ke vi progresu en via scienca kaj kultur-kleriga movado. La tutmonda esperantistaro... vivu !

Alia malagrabla incidento koncernis la naskiĝdomon de Zamenhof. En 1939 oni volis malkonstrui ĝin, ĉar la grundon, sur kiu ĝi staris, aĉetis iu firmao por konstrui telefonan centralon. Pro iu ĝis nun ne tute klara kialo, la forigo de la dometo povis esti evitita, aŭ almenaŭ prokrastita. Neimageble, ke tiu duone ruina dometo restis konservita dum la tuta mondmilito malgraŭ la grandparta forbrulo de la bjalistoka getto, kie ĝi troviĝis. Nur post la milito, en 1953, kiam ŝajne neniu plu interesiĝis pri la sorto de la naskiĝdomo de Zamenhof kaj kiam Esperanto jam riskis esti preskaŭ forgesata, oni fine malkonstruis ĝin por liberigi la lokon, kie oni decidis konstrui loĝblokon.

Bjalistoko en infero

Mankas la spaco ĉi tie eĉ por resumi la nekredeblajn kruelaĵojn, kiujn la nacisocialistoj aranĝis en Bjalistoko. En sia informriĉa kaj eksterordinare interesa libro Zofia Banet-Fornalowa priskribas la ĉefajn eventojn. Koncerne la Esperanto-movadon necesas raporti, ke la 300 personojn nombranta ZES, unu el la plej aktivaj en Pollando, ĉesis ekzisti. Kune kun ĝi kaj kune kun la juda loĝantaro pereis ankaŭ la bjalistokaj esperantistoj, se oni konsideras kelkajn esceptojn, kiuj sukcesis fuĝi kaj postvivi. Inter la unuaj viktimoj troviĝis J. Ŝapiro mem, kiu estis arestita de la nazioj kun ĉ. 5000 aliaj judaj viroj, ĉefe inteligentuloj, sabate la 12an de julio 1941, do nur kelkajn tagojn post la enmarŝo de Wehrmacht en Bjalistokon. La kaptitoj estis kondukita al la kampo Pietraŝe kelkajn kilometrojn ekster la urbocentro, kie ĉiuj arestitoj estis senprokraste murditaj. La edzino de Ŝapiro, Ewa, ankaŭ arda esperantistino, pereis en la lasta likvido de la bjalistoka getto, en aŭgusto 1943. Travivis la katastrofon nur malmultaj samideanoj kiel Szymon Dattner (+1989), dum Josef Murĵan, Szymon Osowicki kaj Eljasz Jabłoński, aliaj ZES-anoj, elmigris postmilito al Israelo. Notindas ankaŭ la mirinda saviĝo de la nevino de Ŝapiro, Felicja Nowak-Raszkyń, kiu skribis sian propran impresan memuaron en la libro „Mia Stelo”.³ Antaŭ la 2a mondmilito loĝis en Bjalistoko ĉ. 50 000 judoj, kaj en 1946, kiam parto de la judaro revenis el Sovetio, restis en Bjalistoko nur 200-300 judoj. Kiel diris lokaj esperantistoj, ŝajnas ke nuntempe vivas tie plu eĉ ne unu „oficiala” reprezentanto de la hebrea gento.

Esperanto en Bjalistoko post la milito

La bjalistoka Esperanto-agado estis postmilito restarigita dank’ al la fervoro de Leon Kłodecki (1912-94), kemiisto, kiu lernis Esperanton en 1924 kaj sekvis kurson ĉe J. Ŝapiro. En 1947 fondiĝis Bjalistoka Filio de Asocio de Esperantistoj en Pollando (AEP), kies prezidanto fariĝis Kłodecki por la venontaj dudek jaroj. Post la neniigo de preskaŭ ĉiuj judoj kaj esperantistoj far la nacisocialistoj, tiutempe Kłodecki plus unu samideano kaj unu simpatianto estis la solaj esperantistoj en la urbo. Sub malfacilaj

³ La libro aperis en la lingvoj pola (Moja gwiazda, 1991), angla (My Star, 1996) kaj germana (Mein Stern, Bleicher 2001). Esperanta traduko estas intencata.

cirkonstancoj Kłodecki sukcesis rehavigi la nomon de Zamenhof al la strato, ĉe kiu la kreinto de Esperanto naskiĝis. Kłodecki revivigis ankaŭ la ideon de la Zamenhof-monumento, krome li sugestis la fondon de Instituto de Esperanto-Kulturo kaj de Esperanto-muzeo. Sed en la kulmino de la stalinisma tempo la kondiĉoj malboniĝis por Esperanto, la movado stagnis dum la jaroj 1949-55, kaj la bjalistoka filio de AEP devis esti malfondita.

La bjalistoka filio de Pola Esperanto-Asocio (PEA), kiel la landa organizo nun nomiĝis, estis refondita en julio 1956, tuj post la 8a plenkunsido de Pola Unuiĝinta Laborista Parto, la komunisma partio de Pollando. Tio montras la politikan dependecon de la Esperanto-movado.⁴ En 1957 estis pendigita tabulo memore al Zamenhof sur tiu loko, kie iam troviĝis lia naskiĝdomo. La unuagradajn Esperanto-kursojn finis 200 lernantoj, kaj la loka gazetaro publikigis multajn artikolojn. Kiam montriĝis, ke la politikaj instancoj faris al la esperantistoj nur promesojn, pluraj fervoruloj krom Kłodecki perdis siajn iluziojn kaj ĉesigis sian agadon. Printempe de 1957 vizitis Bjalistokon la konata nederlanda esperantsito Henk Thien. Du jarojn poste aperis en la urbo Kho Khvat, vic-ministro pri eksteraj aferoj de Indonezio, kiu interkompreniĝis kun bjalistokaj esperantistoj. Poste ankaŭ aliaj eksterlandaj gastoj estis varme akceptitaj, sed ili miris, ke zamenhofaj spuroj en Bjalistoko apenaŭ plu ekzistas.

La neplenumita revo pri la Monumento

Okaze de la 44a jubilea Universala Kongreso de 1959 en Varsovio 550-600 esperantistoj pilgrimis per speciale rezervita vagonaro al Bjalistoko por ĉeesti la plej amasan internacian Esperanto-manifestacion en la naskiĝurbo de Zamenhof. Dum tiu solena tago ili fariĝis atestantoj de la enfundamentigo de ŝtono kaj akto pri starigo de monumento al Zamenhof. Ili vizitis ankaŭ la lokon, kie iam staris la naskiĝdomo de Zamenhof, kiu estis anstataŭita en 1953 de moderna loĝbloko, sur kiu pendis tabulo kun la teksto en du lingvoj: „Ĉi tie staris domo, en kiu la 15an de decembro 1959 naskiĝis kreinto de internacia lingvo Esperanto D-ro Ludoviko Zamenhof.“ Sur la placo renkontiĝis 2000 loĝantoj de Bjalistoko, kaj la salutanta prezidanto de la urba konsilio, Jerzy Krochmalski, esperantisto, esprimis sian esperon kaj deziron, ke UK iam povu okazi en Bjalistoko. Ĉiujn solenaĵojn konkludis la inaŭguro, fare de la prezidanto de UEA, Giorgio Canuto, de tabulo memore al Zamenhof sur la muro de la Elementa Lernejo, kiu ricevis la nomon Lernejo Zamenhof.

En 1972 aperis en iu scienca libro pri la historio de la urbo Bjalistoko la (iom kritika) pollingva studo de Ryszard Kraśko pri L.L. Zamenhof (Esperanto-traduko sekvis poste), kaj en 1987 Tomasz Wiśniewski faris kontribuon per malgranda pollingva libro pri L.L. Zamenhof.

Malgraŭ diversaj klopodoj, la plano starigi la Zamenhof-monumenton en Bjalistoko neniam efektiviĝis. La kolektita mono estis preskaŭ tute elspezita por la konkurso, kaj novaj sumoj ne alvenis. Anstataŭe, en aprilo 1973, okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof, oni inaŭguris ĉe la strato Malmed buston de la majstro. En la tre modesta

⁴ La fama (sekreta) parolado de Nikita Ĥruŝĉov, en kiu li malkaŝis la krimojn de Stalino, okazis en februaro 1956.

festo, dum kiu Leon Kłodecki paroladis kaj la urba vic-prezidanto malkovris la buston, ĉeestis malmultaj bjalistokanoj. Krome, en aprilo 1987, okaze de la centjariĝo de Esperanto, oni inaŭguris novan dulingvan memortabulon sur la muro de la 6a Liceo, ĉe la varsovia strato, kie lernis Zamenhof. Kune kun 150 personoj ĉeestis la ceremonion la reprezentantoj de PEA, Andrzej Pettyn kaj Stanisław Świstak, kaj de la Centra Officejo de UEA, Simo Milojević. Al la kolekto de ideoj aldoniĝis la deklaro de la prezidanto de la Sejmo, Roman Malinowski, pri fondota Monda Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof. Ĉi tiu ideo estis en julio 1987 eĉ oficiale proklamita. Dum la semajno de la 72a UK en Varsovio venis milo da esperantistoj al Bjalistoko por partopreni publikan manifestacion. Nek la ideo pri Zamenhof-monumento, nek la ideo pri Zamenhof-Centro realiĝis, tamen la Fondaĵo Zamenhof klopodas plenumi, almenaŭ en tre reduktita dimensio, la ideon pri la Zamenhof-Centro, daŭre favoratan de multaj esperantistoj, sed malpli de la ekonomiaj faktoroj.

En la 70-80aj jaroj la agado de la bjalistokaj esperantistoj estis konstanta, ricevante pli kaj pli turisman karakteron. Gravan funkcion en tiu rilato plenumis la Bjalistokaj Esperanto-Tagoj. Laŭ decido de la estraroj de Bjalistoka Esperanto-Societo (BES) kaj Vojevodia Filio de PEA, la filio estis malfondita en februaro 1991. En oktobro de la sama jaro tamen okazis la refondo de la filio de PEA, al kiu aliĝis trideko da membroj, kaj la jaro estis dediĉita al la memoro de Jakobo Ŝapiro. La solenaĵojn partoprenis reprezentantoj de Bjalistoka Scienca Societo kaj la urba prezidanto Lech Rutkowski. Ĉeestis ankaŭ Felicja Nowak, la nevino de Ŝapiro, kiu mem saviĝis el holokaŭsto en Bjalistoko kaj loĝas en Kopenhago. Krom ankaŭ tiujn de Stanisław Dobrowolski, Elżbieta Karczewska, Andrzej Zejdlar, Walentyna Fiszer ne eblas mencii ĉi tie la nomojn de ĉiuj meritohavaj personoj.

Klopodoj por Internacia Esperanto-Centro Zamenhof

Lige kun la novaj espero pri la Centro Zamenhof ekestis la filio de Akademio Internacia de Sciencoj – San Marino (AIS) en decembro 1989 kaj estis organizitaj en 1991-93 seminarioj kadre de la Tagoj de Bahaa Esperanto-Ligo. Poste la pola filio de AIS ekagis anstataŭe en Bydgoszcz kaj la tro ambicia projekto pri Bjalistoko kiel grava intelekta Esperanto-Centro dume ne realiĝis. La inaŭguro de Turisma kaj Kultura Informcentro Ludoviko Zamenhof okazis en oktobro 1996 en ĉeesto de d-ro inĝ. Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof, patrono de la Fondumo (Fondaĵo) Zamenhof, kies nova prezidanto en 2000 fariĝis Jarosław Parzyszek, kaj de Osmo Buller, direktoro de la Centra Officejo de UEA. En 1997 d-ro Zaleski-Zamenhof estis elektita de BES kiel plej populara Honora Bjalistokano-Esperantisto. Dank' al la klopodoj de lokaj aktivuloj, estis donitaj al du bjalistokaj stratoj la nomoj: Esperantistów kaj Antoni Grabowski. Pri la evoluo de la agadoj kaj la problemoj ligitaj kun la kreado de la Centro Zamenhof kaj Esperanto-Muzeo raportadis la Esperanto-gazetaro.

Malgraŭ ĉiuj signifaj epizodoj kaj pozitivaj agadoj, kiuj estas listigitaj en ŝia libro, la aŭtorino Zofia Banet-Fornalowa konsideras la rezultojn atingitajn por inda memorado de la Esperanto-heredaĵo en Bjalistoko nesufiĉaj: „Oni povas konstati kun bedaŭro, ke krom mencioj pri Lingvo Internacia en kelkaj gvidiloj tra Bjalistoko kaj similaj materialoj Esperanto kaj la kun ĝi ligita Movado ne trovis sufiĉe vastan kaj meritan

lokon en la historio de la urbo, kie la kreinto de Esperanto naskiĝis kaj pasigis siajn infanjarojn kaj – kiel li mem substrekadis – ĝi multe signifis en lia posta vivo kaj agado.“

Oni forte esperas, ke la 94a Universala Kongreso okazonta en la jaro 2009 donos novajn impulsojn al la fina efektiviĝo de la esperantistaj ideoj kaj revoj en Bjalistoko. En majo 2010 oni memoros la centjariĝon de la Esperanto-movado en Bjalistoko.

Resume laŭ la libro ‚Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko’ (2003) de Zofia Banet-Fornalowa. (Prilaborita de Andreas Künzli)

Interesaj retligoj:

94a Universala Kongreso de Esperanto

<http://94uk.bialystok.pl>

Zamenhof-trajno ĉe Bjalistoko

<http://www.youtube.com/watch?v=vpBe3YnmDks>

Oficiala retejo de Bjalistoko

<http://www.bialystok.pl>

Bjalistoka Esperanto-Societo

<http://www.espero.bialystok.pl/pl/index.html>